

Numero: 240.  
Majo: 2012.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Verda kamparo

Promenante sur verda, flora kamparo, subite mi ekvidis malgrandan papilion. Ĝi estis kolora, fluganta estaĵo, la miraklo de la naturo. Mi haltis kaj revadis.

Ho, se mi ankaŭ povus esti papilio! Kiom bonega tio estus. Mi flugadus libere de floro al floro kaj aŭskultus la triladon de la birdetoj.

Belega estas la vivo de la papilioj. Iliaj koloraj flugiloj, kiel la silko facile ŝvebas en la aero.

Pri kio babilas la papilioj? Ĉu ilin interesas la homoj?

Laŭ mi ili prefere vivas sur verda kamparo. Ilin la homoj ne interesas, ĉar la krono de la naturo ĝenerale estas malbona ulo.

La homo pereigas la terglobon, kaj se Tero ne ekzistos plu, ankaŭ papilioj malaperos por ĉiam. Ili ne ĝojigos nin per siaj ludemaj flugadoj.

Sur Tero restos nur morto kaj mallumo.

Ĉu ni volas tion?

Laŭ mi estas pli bona la papilia mondo, kie ĉiu estas feliĉa kaj libera.

Mi deziras fariĝi papilio sur granda, verda kamparo, kaj sinforgese flugadi kun miaj gajaj kunuloj.

Amiko, venu ankaŭ vi, kaj fariĝu papilio. En iu tago ĉiu fariĝos papilio, kaj ni forgesiĝos pri la malfeliĉo de la mondo.

Tiam printempo daŭras eterne, kaj en nia koro ĉiam estos majo. Nin ne interesos la nigraj nuboj, ĉar ni kaŝiĝos sub etan fungon kaj ĝis daŭras la malbona vetero, tie ni pasigos la tempon. Poste ni eliĝos kaj ni plu flugados dankante al la sunradioj la varman kareson.

Verda kamparo estas mia revo, kio kovros la tutan terglobon. Ĉesiĝos la doloroj kaj homo, kiel frato estimas la alian. Nin naskis sama patrino, la Tero kaj por ni estas malpermesita malami unu la alian.

Espereble tion ankaŭ vi scias, aŭ en via koro tie estas la sento.

Papilioj, papilioj montru al la homaro la veran vojon, kiu kondukas al paca kunvivado. Ni trovu la vorton per kio ni komprenas unu la alian.

Kredu min, tio ne estas neimagebla! Vi devas flugi libere kaj feliĉe super verda, flora kamparo, kiel tiuj multaj koloraj papilioj.

**-Redaktanto-**



## Patra rigoro

La sekvan babiladon mi ekaŭdis tute hazarde en parko. Patro volis konvinki sian fileton pri la neceso de la lingvolernado. Ŝajne la knabo ne deziris lerni tiun lingvon, kiun lia patro proponis al li.

--Fileto mia – li komencis serioze – oni nepre devas lerni fremdajn lingvojn. Sen lingvoscio jam oni ne povas ekzisti.

--Paĉjo, komprenu, mi ne volas lerni la anglan lingvon. Mi prefere lernus iun alian. Laŭ mia scio, ankaŭ vi ne lernis ĝin junaĝe. Vi lernis la rusan lingvon. Ĉu ne?

--Komprenoble, sed tiam ĝi estis devigita lernobjekto. Mi ne povis elekti alian. Nun jam, dank' al Dio estas alia mondo. Mi decidis, vi lernos la lingvon de Ŝekspiro. La duono de la homaro parolas kaj komprenas ĝin. Vojaĝu kien ajn, ĉi lingvo ĉie estas komprenata. Mi volas, ke ankaŭ vi ellernu ĝin.

--La angla lingvo ne plaĉas al mi. La hispana estas pli belsona. Ĝi similas parolante, kiel la trilantaj birdoj.

--Bone, lernu ankaŭ tiun ĉi lingvon, sed unue la anglan. Ĉu komprenite?

--Ĝin mi ne deziras lerni, nur la hispanan. Paĉjo, al mi plaĉas ankaŭ la slavaj lingvoj.

--Fileto mia, vi freneziĝis. Ĉu nuntempe lerni slavan lingvon? Kial? Ĉu vi scias, kiom malfacilas la rusa lingvo? Oni devas ellerni alian, strangan alfabeton. Ĉu vi ŝatus lerni ĝin?

--Tre volonte – li ekridetis – laŭ mi tiu ĉi lingvo estas admirinda. Mi envas vin, ke vi povis lerni ĝin en la lernejo. Kial estis ĉesigita ĝia instruado en la lernejoj?

--Tio estas malfacila demando. Pro politiko ĝi estis instruita devigite. Neniu el ni ŝatis la rusan. Ni estis kontraŭ ĝi. Ĝoju, ke vi jam ne devas lerni ĝin! Mi petas vin, bonvolu lerni la anglan lingvon. Utilas scii ĝin. Mi havas bonegan ideon, ni lernu kune! Ankaŭ mi deziras ellerni ĝin. Post la ekzameno ni vojaĝos al Usono. Mi scias, via songo estas iam ekvidi ĝin. Mi pagos ĉion por vi. Mi petegas, lernu la anglan lingvon!

La knabeto longe silentis. Mi vidis, ke li cerbumas. En liaj okuloj ekbrilis ia mistera lumo, la lumo de la allogo.

**-Ŝaŝa-**



# Maja nokto

Petro jam delonge staris antaŭ la domo. Ĝi estis duetaĝa, bele renovigita. Ĝin prilumis neonlampo. Ĝia flava lumo donis ian misteran senton al la strato.

Li estis sola, nur malproksime bojis hundo dormeme.

En la domo estis mallumo. Eble la domanoj ĉiuj dormis.

La junulo ekfajfis singarde kaj li atendis.

Nenio okazis. Ĉio estis silenta.

Denove li ekfajfis. Nur jam iom pli laŭte. Longa atendado.

En la supra ĉambro io ekmovis. Pala lumo ŝajnis, sed tuj ĝi malaperis.

La koro de Petro ekpulsis kaj gaje li ekiris al la pordego.

Baldaŭe el la direkto de la ĝardeno bruo aŭdiĝis.

--Eva, ĉu vi estas? Mi estas tie ĉi antaŭ la pordego.

Li ne ricevis respondon. Li devis atendi longe ĝis denove li ekaŭdis la bruon. Kvazaŭ iu estus veninta inter la arbustoj.



Li denove demandis:

--Eva, ĉu vi estas?

--Jes – venis la mallaŭta respondo, kio ĝojigis la junulon.

--Ho, kiom mi atendis vin. Mi jam timis, ke vi ne venos.

Dume el la mallumo elpaŝis la knabino. Ŝi surhavis blankan, longan robon. Ŝia hararo ondumante falis sur ŝiajn ŝultrojn.



Ili kisumis unu la alian kaj brakumante staris, kiel marmora skulptaĵo.

Luno scivoleme rigardis ilin sur la firmamento kaj kun la miriardoj da steloj ridetis ĵetante sur ilin el la mioldolĉa pulvoro de la amo.

Longtempe ili staris tie mute. Nun ne sufiĉis la vortoj. El la pulsado de la alia koro ili komprenis unu la alian.

Ofte la muta silento diras pli multe ol la senfina parolo.

La majaj noktoj alportas la amon kaj al ĉiu donas eksterordinaran senton, kiu enĉiziĝas por ĉiam en la homan koron.

Malvarmeta vento traflugis super la domoj de la vilaĝo. La knabino ekstremitis kaj ĉirkaŭbrakumis pli forte Petron kaj fine ŝi demandis:

--Ĉu vi amas min tre, treege?

--Jes karulino mia. Mi amegas vin, kiel la seka kampo la mildan pluvon, kiu estingas ĝian soifon.

--Tio estas bona – ŝi flustris kare – Mi ŝatas la majajn noktojn.

Petro denove ekkisis Evon kaj sekvis longa silento.

En la malproksimo ie aŭto ekbrulis, sed post kelkaj sekundoj la motoro silentiĝis.

La knabino lasis la manon de Petro kaj ŝi ekiris malrapide sur la troturao.

--Nun kien vi iras? – li demandis.

Eva ekridis kaj diris:

--Ni promenu kara. Mi ĝuas ĉi belegan nokton.



--Venu al mi! Ni pasigu kune la nokton! Vi promesis.

--Certe, sed nun mi deziras promeni kaj enspiri tian ĉi freŝan, florodoran nokton.

Petro iom trompiĝante sekvis la knabinon, kiu kvazaŭ estus fluginta antaŭ li. La lunlumo prilumis mistere ŝian sveltan staturon.

Post iom da tempo li rezignis, kaj obeis al ŝia peto. Tra la tuta nokto ili iradis sur la senhomaj stratoj. Ili renkontiĝis kun neniu. La vilaĝo dormis. Nur en kelkaj domoj estis videbla lumo.

Ankaŭ la drinkejoj, kafejoj ĉiuj estis fermitaj.

Jam preskaŭ mateniĝis, kiam ili haltis kaj denove ĉirkaŭbrakumis unu la alian. Ili longe kaj avido kisumadis.

La sango de Petro ekbolis, sed sentis, ke li denove devos atendi ĝis la sekva nokto. Li bedaŭris tion, vere profunde en sia koro io ekpiketis. Ĝis nun ankoraŭ li ne sentis tian.

Kio ĝi estas? Kia sento ludas per lia koro?

Antaŭlonge li legis pri ĝi en iu malnova libro. Ĉu tio estus la amo? Li nur suspektis.

Petro ankoraŭ ne estis enamiĝinta. Li ne sciis, kio ĝi estas.

Ĉu amo estus tio, kio hodiaŭ okazintus al li dum la promonado?

Estis agrable promeni mano en la mano kun Eva kaj haltante admiri Lunon, kiel ĝi rigardis ilin ridetante.

La matenaj sunradioj trovis ilin antaŭ la domo. Eva kisis lin kaj malrapide ekiris en la domon. Ŝi estis tia, kia blanka printempa floro.

-Apáti Kovács Béla-

# Poezio

# Poezio

## La vulpo kaj la tigo

(el *Kroniko de Militantaj Regnoj*)  
elĉinigi S. J. ZEE

Tigo vagiris por elĉaso de viando  
Kaj en ruzega vulpo ĉe arbara rando  
Trovis viktimon.  
"Evidu krimon!"  
Parolis la fripono  
En ton' de gravpersono.  
"Dio min faris reĝo de la  
Grandregno de popolo fela,  
Se vi difektus al mi eĉ hareron,  
Vi tiros al vi la dian koleron.  
Kiel? Vi ne kredas?  
Nu, jam post mi venu  
Kaj atenton prenu,  
Ĉu ne al mi vojon cedas  
Ĉiuj bestoj de l' arbaro!"  
Konsentis tigr' sen kontraŭstaro  
Kaj iris post la grandvostulo.  
Kiam la arbaranoj vidis  
Ilin venantaj, jam rapidis  
Ĉiuj sin savi per diskuro.

## Unu korbo

### Popolkanto el Hebej-provinco

Ĉi tiun korbon iam uzis la avino  
dum almozpeto mantente paĉjon.  
Ĉi tiun korbon iam uzis mia panjo  
dum legomserĉo en malsata jaro.  
Ĉi tiun korbon iam uzis la bofranko  
por sendi orajn vovo-jn al la kampo.  
Ĉi tiun korbon portas nun mi mem, por preni  
spicitajn panojn el komun-manĝejo.  
Senlime bona -- la popola komunumo,  
ĉiele vasta -- la Partia amo.



## Mia filineto de Marjorie BOULTON

Ne estas mi unu el noblaj koroj  
virinaj, tre pensantaj pri infanoj;  
infanoj estas zorgoj kaj laboroj,  
etaj, mallertaj kaj malpuraj manoj.

Mi ne kapablas plu por hejmaj amoj,  
ne ŝatas ĝenojn kaj sendankan strebon  
sed nun, malofte, sur dezertaj mamoj,  
la korpo kreas sian ombran bebbon.

Mi ne deziras vin, infano mia,  
mi nun libera, iomete riĉa,  
komforte vivas -- restu vi nescia  
en la mallumo, eble pli feliĉa.

Kara, vi eĉ malamuz min, patrinon,  
malindan min; kuŝiĝu en eterne!  
Kvankam mi nun karesas halucinon,  
ĉu vere estas vi mia koncerno?

Sur mia sino dum moment' siestu,  
frukto de ombra amo, frukto honta;  
foriru poste, filineto, restu  
eterne en la mondo ne-estonta!

Etaj manplatoj, rozkoloraj plandoj --  
ho, etulino! Sed okuloj brilas  
jam larme -- superbolas per demandoj  
pri l' vivo -- al la patro vi similas!



# Por infanoj

## Fratoj Grimm: Elektitaj Fabeloj

### La senditoj de morto

En tempoj malnovaj migris foje giganto sur granda vojo; subite fremdulo saltis renkonte al li kaj kriis:

"Haltu, neniun paŝon plu!"

"Kio?" diris la giganto, "vi hometo, kiun mi povus dispremi inter la fingroj, vi volas bari al mi la vojon? Kiu vi estas, ke vi parolas tiel arogante?"

"Mi estas la morto," respondis la alia, "ankaŭ vi devas obei miajn ordonojn."

Sed la giganto rifuzis kaj komencis batali kontraŭ la morto. Longa kaj furioza estis la batalo, fine la giganto venkis kaj per unu bato de la pugno faligis la morton. La giganto iris sian vojon kaj la venkita morto kuŝis apud ŝtono kaj estis tiel senforta, ke ĝi ne povis leviĝi.

"Kio okazos," diris ĝi, "se mi kuŝos ĉi tie en la angulo? Neniu plu mortos en la mondo, kaj ĝi estos tiel plenigita de la homoj, ke ili ne havos sufiĉe da loko por stari unu apud la alia."

Dume venis juna viro, freŝa kaj sana, kantis kaj ĉirkaŭrigardis. Ekvidinte la duone sveninton, li komplete proksimiĝis, levis ĝin, el sia botelo verŝis en ĝian buŝon vivigan trinkaĵon kaj atendis, ĝis ĝi refortiĝis.

"Ĉu vi scias," diris ĝi ekstarante, "kiun vi revivigis."

"Ne," diris la junulo, "mi ne konas vin."

"Mi estas la morto, mi indulgas neniun, mi ne povas fari esceptojn por vi. Sed por pravi mian dankemon mi promesas al vi jenon: mi ne surprizos vin; antaŭ ol mi venos por preni vin, aperos miaj senditoj."

"Bone," diris la junulo, "mi almenaŭ scios, kiam vi venos kaj ĝis tiu tempo estos trankvila."

Li foriris. Ĉiam li estis kontenta kaj gaja kaj vivis pensante neniam pri la morgaŭa tago. Sed la juneco kaj sano daŭris ne longe, baldaŭ venis malsanoj kaj suferoj, kiuj turmentis lin tage kaj malhelpis lin dormi nokte.

"Mi ne mortos," li diris al si mem, "ĉar antaŭe devas aperi la senditoj de la morto; mi nur dezirus, ke pasu baldaŭ la malfacilaj tagoj de la malsano."

Kiam li resaniĝis, li rekomencis la antaŭan gajan vivon. Foje iu ekfrapis lian ŝultron: post li staris la morto kaj diris:

"Sekvu min, venis la lasta horo de via vivo."

"Kiel," respondis la viro, "ĉu vi ne promesis, ke antaŭ via veno aperos viaj senditoj? Mi vidis neniun."

"Silentu," respondis la morto, "ĉu ili ne aperis unu post la alia? Ĉu ne venis la febro, kiu skuis vin kaj faligis sur la liton? Ĉu la kapturino ne vizitis vin? Ĉu la artrito ne gastis en ĉiuj viaj membroj? Ĉu ne zumis en viaj oreloj? Ĉu la dentdoloro ne mordis viajn nervojn? Ĉu ne fariĝis mallumo en viaj okuloj? Ĉu mia samsanga frato, la dormo, ne rememorigis min al vi ĉiuvespere? Ĉu vi ne kuŝis ĉiunokte kvazaŭ senviva?"

La viro ne sciis, kion respondi, obeis la fatalon kaj iris kun la morto.

---

## FABELAJ BILDOJ



# Printempo

# Printempo

